

5

1980

MONATA REVUO
FONDITA
EN JARO 1903

OFICIALA ORGANO
DE I.K.U.E.
INTERNACIA
KATOLIKA UNUIGO
ESPERANTISTA



ESPERO
KATOLIKA

INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO
ESPERANTISTA*Honora Prezidanto:*

Sac. Alfons Beckers
Rozenlaan, 5
B - 3950 Beringen (Belgio)

Prezidanto:

Sac. Duilio Magnani
viale C. Zavagli, 73
I - 47037 Rimini/Forlì, Italio

Vicprezidantoj:

Sac. Roger Degrelle, 11 cours Léopold, F-54042
Nancy Cedex, Francio;
Sac. Józef Gotter, Trzebnice 113, PL-59.312
Chocianowice, Pollando

Sekretario:

Antonio De Salvo

Kasisto:

Sac. Felice Ruaro, I-37010 Costermano (Verona),
Italio

Estraro:

A. Beckers, R. Degrelle, A. De Salvo, R. Forycki,
J. Gotter, L. Kóbor, J. Kondor, J. Korytkowski,
F. Ruaro, J. Zielonka

Plenumkomitato:

Aŝtrio: W. Mudrak; *Belgio:* E. Paesmans; *Ĉeĥo-
slovakio:* J. Pastrnakova, M. Šváček; *Francio:* L.
Bourdon; *F.R. Germanio:* B. Eichkorn; *Hispanio:*
M. Casanoves; *Hungario:* E. Stancz; *Italio:* A. Cic-
canti, S. Giachino, G. Pisoni; *Nederlando:* S. P.
Smits; *Pollando:* J. Korytowska, J. Kos, B. Sobol;
Svislando: F. Bommer; *Usono:* A. Herschel

Centra Oficejo:

Via Berni, 9
I - 00185 Roma (Italio)
tel. (06) 7588388
poŝta konto 23290000
Direktoro: Antonio De Salvo

Oficiala organo:

Espero Katolika

Kotizo por 1979:

20 svisaj frankoj aŭ egalvaloro

Registriĝo ĉe la Tribunalo de Romo

(Registrazione presso il Tribunale di Roma)
n. 17138, 11-2-1978

Respondeca Direktoro (Direttore Responsabile):

Antonio De Salvo
C.P. 4017, I - 00100 Roma Appio (Italio)
tel. (06) 780782 (vespere)

Presejo (Tipografia):

ROTATORI
Viale Manzoni, 22/b - Roma

MAJO 1980

Sur la kovrilo: preskaŭ en monda premiero, vati-
kanaj poŝtmarkoj pri la vojaĝoj de l' Papo en 1979
(v. p. 72).

ENHAVO

- 67 Ankoraŭ pri Esperantaj Diservoj (*A. De Salvo*)
- 68 Diservoj en Stokholmo
- 69 Apostola beno (*A.D.S.*)
- 70 Ni funebras kaj kondolencas
- 71 Ni dankas
- 71 Nova Estrarano
- 71 Asociaj notoj
- 72 La vojaĝoj de l' Papo (*A. De Salvo*)
- 74 Afrika saĝo
- 75 Ni gratulas
- 76 Papaj preĝintencoj por junio
- 76 Papaj preĝintencoj por julio
- 77 Lingvaj problemoj en la Eklezio
- 79 Legantoj skribas (*P. Urbaitis, J. Zielonka, F. Bardecka*)
- 81 Diplomata respondo (*T. Juhász*)
- 81 Heroldo jubileas
- 82 Agado ĉe Seminarioj (*B. Müller, B. Eichkorn*)
- 84 Landaj reprezentantoj de IKUE

La fotoj de ĉi tiu numero estis aĉable liveritaj de:
Filatela Oficejo de Vatikano; A. De Salvo (Italio);
P. Urbaitis (Brazilo).

Periodico culturale - gruppo III - pubbl. inf. 70% -
lire 600.

Kultura periodaĵo - monata - malpli ol 70% da
reklamo - 600 lirojn.

ANKORAŬ PRI ESPERANTAJ DISERVOJ

La Prezidanto de IKUE havigis al Kard. James R. Knox, Estro de la Kongregacio pri Sakramentoj kaj Dia Kulto, ĉi tiun leteron (en itala lingvo), datitan 24.4.1980:

Tre respektinda Eminenco,

en mia kvalito de Prezidanto de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, kaj rilatante al la direktivoj al ni afable donitaj per letero CD 888/79 (koncerne la rajtigon celebri la S. Meson en lingvo Esperanto okaze de kelkaj internaciaj aŭ plurnaciaj Kongresoj de la jaro 1979), mi permesas al mi turniĝi al V.E., por peti, ke la saman rajtigon oni donu ankaŭ por la esperantistaj Kongresoj kun internacia aŭ plurnacia karaktero planataj por la kuranta jaro 1980, kaj precipe por tiuj de Stokholmo (Svedio), Malto, Madrido (Hispanio), Zagrebo (Jugoslavio), Udine kaj Manfredonia (Italio).

La supra peto estas bazita sur pure paŝtistaj konsideroj, ĉar, okaze de la diritaj Kongresoj, la unika lingvo komuna al la partoprenantoj estas, ĝuste, Esperanto, tiel ke la uzo de aliaj lingvoj ne atingus, konkrete, la celon igi la fidelulojn aktive partoprenantaj en la celebrado.

Bonvolu akcepti, Eminenco, la humilan omaĝon de mi kaj de la esperantistoj de mi reprezentataj, kiuj nur petas, ke ili povu esti ĉiam pli konsciaj partoprenantoj en la liturgiaj celebradoj, kaj, samtempe, obeemaj filoj de la Eklezio.

Dev.ega Sac. Duilio Magnani

Responde, venis ĉi tiu letero (en itala lingvo), datita 23.5.1980:

Tre respektinda Sinjoro,

atingis ĉi tiun Kongregacion la letero de 24.4.1980, n. 590/80, per kiu Vi petis la rajtigon uzi, pro paŝtistaj kaŭzoj, la liturgiajn tekstojn tradukitajn en esperanton en la eŭkariaj celebradoj, kiuj havos lokon okaze de la esperantistaj Kongresoj laŭ internacia aŭ plurnacia karaktero, planataj por la kuranta jaro 1980.

Rilate tion, mi ĝojas komuniki al Vi, ke la Sankta Patro, akceptante la peton, konsentis « pro korfavo » la rajtigon celebri la Sanktan Meson en esperanto, dum la diritaj Kongresoj.

Lo uzo da esperanto estas limigata al la Mesoj celebrataj por la solaj kongresanoj, kaj la konsento validas nur por la cirkonstancoj supre indikitaj. Eventualaj postaj petoj pri tio devos esti ekzamenataj unuope.

Akceptu la esprimon de mia respektoplena saluto, per kiu mi diras min dev.ega en la Sinjoro

James R. Kard. Knox

Prefekto

Virgilio Noè
Sekretario

Surbaze de personaj kontaktoj kun funkciulo de la Kongregacio, mi konvinkigis, ke en la nuna tempo la maksimumo, kiun oni povas esperi de la Kongregacio mem, estas ĝuste la teksto supre publikigita. Estas vere, pri tio, ke ĝi daŭre enhavas gravajn limigojn (la Meso en Esperanto, laŭ ĝi, estas rajtigata nur por 1980, nur okaze de internaciaj aŭ plurnaciaj kongresoj, kaj nur por la kongresanoj); sed estas ankaŭ vere, ke la Kongregacio *por la unua fojo* eksplicite agnoskis, ke ekzistas iu *paŭstista problemo*, nome, ke la Esperantistoj ne estas simplaj hobiuloj, kiuj deziras la Meson en Esperanto pro pure kulturaj celoj. Ankaŭ estas rimarkinde, ke pasintjare estis rajtigataj nur *kvar* kongresoj (Lokarno, Lucerno, Luksemburgo kaj Jesolo L.), dum ĉijare estas rajtigataj *senescepte ĉiuj* kongresoj kun *internacia* aŭ *plurnacia* karaktero (ankaŭ ĉi tiu nuanco estas substrekinda: ja, sufiĉas la ĉeesto de *unu* alilandano, por ke eĉ *nacia* kongreso iĝu *plurnacia*, kaj ekvalidu la regulo, eldirita *pro paŭstistaj kaŭzoj*, ke oni ebligu al ĉiuj partopreni en la diservo, per la sola lingvo komuna al ĉiuj, ĝuste Esperanto).

Fine, mi volas emfazi, ke kiam, post kelkaj jaroj, oni povos kalkuli pri sistema rajtigo de la Esperantlingvaj Mesoj (formale, unuope konsentataj, sed, esence, ĝeneralece donataj), estos tre pli facile apogi sin sur la forto de la precedento, kaj peti konstantan rajtigon sen datlimo. Tiam, oni povos vere diri, ke la uzado de Esperanto en liturgio eliris el la « eksperimenta » fazo kaj iĝis stabila.

Antonio De Salvo

DISERVOJ EN STOKHOLMO

Dimanĉon 3.8.1980, okaze de la 65-a Universala Kongreso de Esperanto, havos lokon Meso en la Internacia Lingvo en la Katedralo de Stokholmo, Svedio, tuj post la Ekumena Diservo.

Katolikaj sacerdotoj, kiuj planas ĉeesti en la Universala Kongreso, estas petataj urĝe kontakti la Centran Oficejon de IKUE en Romo, por praktike aranĝi la Meson.

Ĉar povus okazi, ke neniu esperantista sacerdoto partoprenos en la U.K., oni devas antaŭvidi ankaŭ la eblecon aranĝi, eventuale, Meson en latina lingvo (fare de neesperantista sacerdoto), kun legajoj kaj kantoj en Esperanto. Tiucele, ankaŭ katolikaj laikoj estas petataj kontakti la Centran Oficejon, por ĝustatempe plani la koneksajn iniciatojn.

● Serĉata Sacerdoto, kiu intencas ĉeesti la 2-an Tut-Pacifikan Kongreson de Esperanto (26-29.7.1980) en Vankuvero, Kanado. Oni klopodas aranĝi S. Meson en Esperanto, kaj oni bezonas Sacerdoton, kiu scipovas ĝin. Kontaktiĝu kun: Mark Weddell, P.O.B. 1042, Indian Rocks Beach, FL 33535, Usono.

APOSTOLA BENO

Kiel anncite en EK 4/80 (p. 47), P. Magnani estis akceptita en ĝenerala aŭdienco, 19.4.80, de Papo Johano Paŭlo dua, en la kadro de amasa pilgrimado (ĉirkaŭ 12.000 homoj) de la diocezoj Rimini, San Marino, Montefeltro (komuna Episkopo, Mons. Giovanni Locatelli: pri li, v. EK 3-4/79, p. 60), Cesena kaj Sarsina (komuna Episkopo, Mons. Luigi Amaducci: pri li, v. EK 9/78, p. 165). En la sama aŭdienco partoprenis ankaŭ De Salvo (verŝajne li estis la sola ĉeestanta romano en la grandega salono!).


En tiu okazo, estis donacitaj al la Papo kelkaj publikaĵoj: jarkolekto 1979, lukse bindita, de «*Espero Katolika*»; «*Decimala Katalogo de la Planlingva Literaturo ĉe la Katolika Universitato de Lublino*»; «*Enkonduko al Ekumenaj Problemoj*»; «*La Chiesa e il problema della lingua ausiliare internazionale*» (en itala lingvo). En akompana letero, oni substrekis, ke «*Espero Katolika*» raportas pri la oficiala penso de la Eklezio, kaj ke ĝi estas aparte atendata kaj aprecata en orienteŭropaj landoj; ke la Katolika Universitato de Lublino, kie la Papo mem instruis, havas gravan Esperanto-Bibliotekon; ke la ekumena verko ŝuldiĝas al la Help-Episkopo de Varsovio, esperantisto; kaj ke per la eseo de P. Korytkowski, nun docento en la Katolika Universitato de Lublino, IKUE ne intencas batali kontraŭ latino, oficiala lingvo de la Eklezio.



Mons. Miziołek, Helpepiskopo de Varsovio (Pollando), aktive partoprenas en E-agado. Jen li, en septembro 1976, ĉe la prezida tablo de la 50-a Itala Kongreso de Esperanto en Massa, apud Antonio De Salvo (foto D'Iorio)

Dum la aŭdienco, iumomente la Papo pasis tuj apud P. Magnani, kiu kaptis la okazon por prezenti al li numeron 3/80 de EK, kun bildo de Johano Paŭlo dua surkovrile. La Sankta Patro ameme ridetis kaj diris: « *Ha, la Esperantistoj!...* », kaj bonvole benis.

A.D.S.



Johano Paŭlo dua ridetas al P. Magnani (foto Felici)

NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

† Igino Giordani, *Italio*, ĵurnalisto, animo de la religia movado "*Focolarini*", direktoro de la revuo "*Città Nuova*" (kiu ankaŭ aperis, dum kelka tempo, en Esperanto, kun la titolo "*Nova Civito*");

† Clément Eloi Motillon, *Francio*, 85-jara, sprita preleganto, verkisto kaj tradukisto.

† D-ro Maximilian Fühling, *Aŭstrio*, dum jardekoj membro de Aŭstria Katolika Ligo Esperantista, kaj dum pluraj jaroj Prezidanto de la Ŝtata Ekzamenkomisiono pri Esperanto;

† Prof. Sac. F.M. Zimmerl, *Aŭstrio*;

† la Patrino de P. Jòzef Zielonka, *Pollando*.

Ni memoru pri ili en niaj preĝoj.

Al la funebrantaj familioj, multajn kondolencojn.

NI DANKAS

Donacis monon al IKUE:

Aŭstrio: Brettauer; *Britio*: Harris; *F.R. Germanio*: Hagel, Kalicinski, Kasselmann, Kleber; *Italio*: Magnani.

Donacis Esperantajojn al IKUE:

Aŭstralio: Hanhiniemi; *Aŭstrio*: Mudrak; *Belgio*: Movado Sen Nomo; *F.R. Germanio*: Kondor; *Italio*: De Salvo, Minio Paluello Minnaja C., Zaccchè F.

Al ĉiuj donacintoj, multan dankon.

NOVA ESTRARANO

Sekve de la ekŝigo de Kindler el la Estraro, kaj surbaze de la respondoj de la sekvaj kandidatoj (v. EK 4/80, p. 49), nova Estrarano de IKUE fariĝis P. Lajos Kóbor el Hungario.

Koran bonvenon!

ASOCIAJ NOTOJ

● D-ro Johano Hamvai, ĝisnuna Landa Reprezentanto por Novzelando, havigis al IKUE leteron, en kiu, interalie, li diras:

« En septembro mi fariĝos jam 78-jara, kaj mia sano, depost lastjara grava operacio, ne estas la plej bona. Pro tio mi decidis, ke mi rezignas pri la landa reprezentanteco por IKUE, kiun mi tenis dum pli ol 25 jaroj. La tempo pasas, tion ni ĉiuj devas foje rekoni.

Mi sukcesis trovi (inter la nur kelkaj katolikaj samideanoj) unu bravan, katolikan, junan samideanon, kiun mi povas tutkore rekomendi kiel mian posteulon: s-ro G. D. Raynor, 49 Sunny Grove, Wainuiomata, Wellington, Novzelando. Li volonte akceptas la respondecon, kaj, krom tio ke li estas juna, lia avantaĝo estas, ke li loĝas en la ĉefurbo ».

IKUE tutkore dankas d-ran Hamvai pro lia senlaca agado, kaj bondeziras al li bonfarton. Samtempe, ĝi bonvenigas la novan Landan Reprezentanton.

● *Nova adreso de la Landa Reprezentanto de IKUE en Usono*: Mark B. Weddell, P.O.B. 1042, Indian Rocks Beach, Florida 33535, Usono.

LA VOJAĜOJ DE L' PAPO

Vatikanaj Poŝtoj eldonos, 24.6.1980, serion de 7 poŝtmarkoj, en totala nominala valoro de 8.500 liroj (10 usonaj dolaroj), por memori la vojaĝojn de Papo Johano Paŭlo dua en 1979.

Tio donas al ni la okazon retrorigradi la jaron 1979, kiu, por 700 milionoj da katolikoj, estis vera deirpunkto, pro la doktrinaj instruoj de Johano Paŭlo dua, faritaj precipe dum liaj spektaklaj vojaĝoj. En 1979 estis prezentitaj la direktivoj, sur kies bazo la Papo intencas gvidi la katolikan ŝafaron kaj, samtempe, proponi referencan punkton al ĉiuj homoj, kiuj sopiras al spirita libereco.

Kiel diris Vatikana Radio 18.5.1979, « en malfacilaj momentoj, la Sinjoro donis al sia Eklezio ĉefon junan kaj decideman; Papon, kiu kapablis disradii ĉirkaŭ sin senton de aŭtoritato, de forto, de sekureco; tiu sekureco, kiu al li venas de neskuebla fido kaj de senfina amo al la homaro. En epoko, kia tiu nuntempa, en kiu la homaj ideologioj tragike montris sian kompletan fiaskon, ne nur katolikoj, sed la tuta homaro fine turnos la okulojn al la Papo, al *ĉi tiu* Papo, por havi de li tiujn certecojn, kiujn ĝi dum tro longa tempo vane serĉis ».

Post tiu dato, Johano Paŭlo dua, kiu jam estis alvokinta ĉirkaŭ sin milionojn da sandomingaj kaj meksikaj fideluloj, vojaĝis al Pollando, al Irlando, al Usono, al Unuiĝintaj Nacioj kaj al Turkio.

10.6.1979, Vatikana Radio tiel komentis la vojaĝon de Johano Paŭlo dua al Pollando: « Ĉiuj devas esti dankaj al ĉi tiu Papo, kiu, en la mallonga tempospaco de la malmultaj tagoj je dispono, submetante sin al streĉoj samtempe penigaj kaj entuziasmigaj, el predikejo, kien liaj antaŭuloj ne sukcesis supreniri, pledis por frateco; por paco kaj kunlaboro inter ĉiuj nacioj; por la valoro kaj la netuŝebla digno de la vivo kaj de la homa laboro; por la neanstataŭigebla funkcio de familio; por la respondeco sendistinge de ĉiuj, kaj precipe de la junularo, en la neprokrastebla neceso konstrui, kiel eble plej baldaŭ, pli homecan mondon. Li laŭte diris, ke la klopodo malebligi al Kristo, al Dio, renkontiĝi kun la homo, egalas al senigo el la homo de la ĉefa el liaj neforigeblaj rajtoj. Papo Wojtyła pruvis, kune kun la polaj fideluloj, ke la kredo ne malhonoras, sed, kontraŭe, ĝi plialtigas la homan dignon, la amosentojn, la respondecojn al sia patrolando kaj al ĉiuj homoj, la sindevigon por komuna bono, kiu kapablu ampleksi ĉiujn naciojn kaj la tutan mondon ».

Poste, la vojaĝo al Irlando, kun la preĝpeta alvoko al paco kaj frateco en la justeco; la neforgesebla parolado ĉe Unuiĝintaj Nacioj; la triumfa akcepto en Usono. « Papo Johano Paŭlo dua — skribis, en tiuj tagoj, la gazeto *New York Times* — pruvis aferon, kiun ni usonanoj estis forgesintaj: unu sola homo, kun fortaj moralaj konvinkigoj kaj noblaj aspirioj, povas trafi la koron de vasta kontinento ».

En Novjorko, Papo Wojtyła skuis eĉ Harlemon, la malriĉegan negran kvartalon, kiu neniam, pli frue, omaĝis surstrate al iu ajn, des malpli al blankulo. Ĉifoje, la negroj de Harlemono milope aplaŭdis tiun, kiu fine indikis la vojon de la veraj homaj rajtoj.

La tutmonda gazetaro parolis pri « triumfo ». Sed temas pri miriga triumfo, ĉar Johano Paŭlo dua ne ĉesas kondamni la moralan anarkion kaj la mankon de spirita sinteno en la nuntempa konsumisma socio. Sen ambigueco, Papo Wojtyła kondamnis la egoismon de riĉuloj, la perfortojn de la potenculoj, la dissolvigon de la familioj, divorcon, aborton, la artefaritan limigon de naskoj, la ekstergeedzajn seksajn rilatojn, kaj konfirmis la devon de la pastra celibato.

La « sekreto » de tiu triumfo kuŝas, verŝajne, ĝuste en la fakto, ke de tro longa tempo la homoj atendis iun, kiu, kun la bezonata morala forto, ekzaltu la iamajn valorojn, kaj ne hezitu prediki la veron, eĉ se, tiel farante, ne eblas eviti kritikojn, kaj ne eblas plaĉi al ĉiuj.

La lasta vojaĝo de 1979 (laŭ dato, ne laŭ graveco) estis tiu al Turkio, renkontiĝejo de diversaj religioj kaj kulturoj. Tie, Papo Wojtyła ne nur akcelis la unuigan proceson kun ĉiuj kristanoj, sed li ankaŭ lanĉis alian mesaĝon, substrekante la urĝon, ke kristanoj kaj muzulmanoj agnosku kaj kreskigu la spiritajn ligojn, kiuj kunigas ilin.

La vojaĝoj de la Papo daŭris ankaŭ en ĉi tiu jaro 1980 (Afriko, Francio), dum jam estas anoncintaj vizitoj al Brazilo kaj al Lurdo/Lourdes (Francio).

En Afriko, kiel skribis la itala gazeto « *Il Corriere della Sera* », la bilanco de la vojaĝo ne povas ne inkluzivi la severan kritikon, kiun Papo Wojtyła faris pri la okcidentaj mitoj. Li eniĝis en la afrikan realon kun spirito pura el la okcidentaj principoj kaj antaŭjuĝoj, kaj plurfoje li instigis la afrikanojn konservi siajn bonajn tradiciojn, kiuj, ofte, harmonias kun kristanismo plimulte ol tiuj de multaj okcidentaj eklezioj, kiuj, kelkfoje, iĝis nuraj malgrandaj insuloj en maro de laikeco, kun tre akraj pintoj de kontestado. Ĉefa celo de la vojaĝo estis, diri definitivan vorton pri la rilatoj inter kristanismo kaj afrika kulturo: ĉi tiu vorto estis « *jes* » al la afrikaj tradicioj, kondiĉe, ke ili ne estu en kontrasto kun la roma doktrino.

En Francio, Johano Paŭlo dua surprizis kaj entuziasmigis la amasojn, memorigante la valorojn de la franca revolucio: li ripetis la revolucionan frazon *libero, egaleco kaj frateco*, kvankam — li substrekis — tiuj, kiuj formulis ĉi tiujn idealojn, ne referencis al la alianco kun Dio. Malgraŭ tio, tamen, ili estas kristanaj ideoj.

Antonio De Salvo

● La junaj gefratoj Jacko (10-jara) kaj Dorota (7-jara) Rawiak, ul. Kościuszki 51/23, PL-08.400 Garwolin, Pollando, deziras korespondi per bildkartoj kaj mallongaj leteroj, pri hundoj, katoj k.a.

AFRIKA SAĜO

Temo, pri kiu oni povas multe diskuti, estas tiu de aŭtoritaro. Al ĝi ni subiĝas, kiam eblas ni ribelas, se ĝi mankas ni plendas; sed ni ne kapablas vivi sen ĝi. « Neniu reĝo, urbo perdita » (nago).

Malgraŭ ŝajnoj, ne ekzistus aŭtoritato se ni ne facile iĝus subuloj: « Por ke reĝo estu reĝo, estas necese subteni lin » (fon). Ni protestas, ĉar « Diskuto kun la estro estas disputo » (kongo): sed ni akceptas tion.

Ĉu vi rimarkis, ke « Ekzistas eksterordinaraj estroj; ne ekzistas eksterordinaraj simplaj subuloj »? (nyanga). « Radikoj ne scias, kion folioj decidas » (bantu): la subuloj ne konas la profundaj pensojn de tiuj, kiuj staras alte. « La reĝo vidas ĉion » (ashanti), ankaŭ por la aliaj. Stranga rolo, tiu de la estro! « Regado estas sufero » (nyanga), « La koro de la estro estas simila al tiu de elefanto » (kongo): ĝi devas multon toleri. « La koro de la estro estas kvazaŭ rubujo, en kiun oni ĵetas la bonajn kaj malbonajn forĵetaĵojn » (kongo).

Al la estroj oni ne alproksimiĝas sen donacoj: « Nuda mano ne kaptas fajron » (peul). Oni devas adaptiĝi je la cirkonstancoj: « Kiam simio reĝas, estas saĝe danci antaŭ ĝi » (douala); kaj « Se iu estro donacas al vi ringon, ĝin kaŝu sub vian veston » (chagga), por ke la aliaj ne ekvidu, ke vi estas preferata.

Oni ne lernas aŭtoritaton: « Arbotrunko restas cent jarojn en la marĉo, sed ĝi ne iĝas krokodilo » (ewe). Kiu volas imiti la estron, iĝas ridinda: « Sardino, kiu volas iĝi baleno, faras al si malbonon » (bantu). « Nur kiam akcipitro krias, birdoj ne plu pepas » (ewe).

Kritikoj ofte estas senutilaj: « La kvakado de ranoj ne malhelpas, ke la elefanto trinku » (peul); ili povas ankaŭ esti danĝeraj: « Oni ne insultu krokodilon antaŭ ol transpasi riveron » (ewe). Estas pli saĝe memori, ke ni ĉiuj estas egalaj: « En la koto la spuroj de la estro ne distingiĝas » (niam-niam); « Suno leviĝas eĉ se koko ne krias » (rundi). Aŭtoritato estas relativa koncepto: « En mia vilaĝo oni taksas min leopardo; ekstere, sovaĝa kato » (mongo).

Nago, fon, kongo, nyanga, bantu, ashanti, peul, douala, chagga, ewe, niam-niam, rundi, mongo: afrikaj popoloj.


● Sabate 10.5.1980, dum dioceza kunveno de diversmediaj animzorgantoj, la Episkopo de Gdansko (Pollando), Mons. Lech Kacmarek, publike nomis sacerdoton Stanisław Płatek dioceza animzorganto por esperantistoj, kaj disponigis, tiucele, la preĝejon de S. Andreo Bobola en Sopot.

Sopot situas inter Gdansko kaj Gdynia.

NI GRATULAS

● Post unujara klopodo, Prof. Josip Velebit (Jugoslavio) prelegis, 25.11.1979, en la Teologia Fakultato de Zagrebo, cele al starigo de Esperanto-kurso. La 27-an de novembro, la kurso ekfunkciis en unu el la lernejoj de la Fakultato. Partoprenis 19 kursanoj. Pro la granda okupiteco de la teologiaj studentoj, oni devis ofte ŝanĝi la lernotagojn kaj la lerno-horojn. Tamen, ĉirkaŭ 15 kursanoj konstante partoprenis la lecionojn. La kurso okazis laŭ Ĉe-metodo, sed aliformita por la aparta medio de la lernantoj. En la antaŭpreparo de la kurso multe helpis Mons. Djuro Pukec, Rektoro de la Teologia Fakultato, kiu ankaŭ estas IKUE-ano.

● Preskaŭ 150 homoj, el 16 brazilaj urboj kaj el Argentino kaj Urugvajo, partoprenis, de la 23-a ĝis la 27-a de januaro, en la 3-a Junulara Brazila Esperantista Renkontiĝo. Inter la aŭtoritatuloj, kiuj ĉestis la solenan malfermon, troviĝis du Episkopoj: José Melhado kaj J. Lambert Filho, kiuj salutis en la nomo de la regiona diocezo. Sankta Meso en Esperanto estis celebrita de P. Petro Urbaitis, en la Kapelo honore al Sankta Vincento.



Kuncelebrado de Esperantlingva Meso en Juiz da Fora (Brazilo), dum la 3-a Junulara Brazila Esperanto-Renkontiĝo

● En la numeroj 304 (oktobro 1979), 306 (decembro 1979) kaj 308 (februaro 1980) de la filatela gazeto "La Philatélie française", aperis artikoloj (daŭrigotaj) de nia IKUE-ano Jean Amouroux, pri "Esperanto kaj filatelo", zorge dokumentitaj kaj provizitaj per multaj bildoj.

"La Philatélie française", organo de la Francaj filatelaj Societoj, atingas 80.000 filatelistojn. Jean Amouroux, siavice, estas, plej verŝajne, unu el la plej kompetentaj kolektantoj de Esperanto-filatelaĵoj en la mondo (se ne la plej kompetenta).

● Usonaj IKUE-anoj vigle aktivis en la neŭtrala movado. Richard Ranczorgis pri Esperanto-ekspozicio dum la Kongreso, okazinta en San Francisko de la 27-a ĝis la 30-a de novembro 1979, de la Asocio pri Modernaj Lingvoj; Charles Marr, urba instruisto en Novjorko, prizorgis Esperantokurson por gepatroj kaj infanoj; Ellen Lewis estis unu el la membroj de la komitato, kiu organizis Esperanto-ekspozicion por celebrado okazinta en Bostono en novembro 1979; Alberta Casey, dum la ĵus pasintaj monatoj, kaptis la atenton de novjorka radiostacio kaj de ĵurnaloj en Novjorko, Misurio kaj Kalifornio.

Komentante la aferon, en la paska numero de la "Novaĵletero" de la usona sekcio de IKUE (ACES), Kevin Laughery skribis: "Estas kuraĝige noti, ke ni ACES-anoj elstaras per vigla agado en la neŭtrala medio, precipe kiam oni konsideras nian malmultecon. Ŝajnas al mi, ke la tempo baldaŭ alvenos kiam ni kaptu okazon por elstari eksplicite kiel katolikoj. Mi persone esperas tiucele helpi la aferon, pere de du artikoloj petitaj de la Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko (ELNA), unu pri Vatikana Radio kaj la alia pri la Papo kaj Esperanto, kiuj devos krei pli da intereso pri la Katolika Esperanto-Movado".

PAPAJ PREĜINTENCOJ POR JUNIO

Generala: por ke la gejunuloj serioze sin preparu antaŭenigi « la civilizon de la amo ».

Misia: por ke en Azio la sperto kaj la praktikado de la preĝo de ĉiuj, kiuj kredas je Dio, sin malfermu al la pleneco de la evangelia lumo.

PAPAJ PREĜINTENCOJ POR JULIO

Generala: por ke la kristanaj laikoj konduku kiel veraj atestantoj de Kristo, kaj sin devigu solvi la problemojn de la civila socio laŭ la doktrino de la Eklezio.

Misia: por ke la homoj de la « tria aĝo » plimulte kunlaboru al la misiaj agadoj.

LINGVAJ PROBLEMOJ EN LA EKLEZIO

● Johano Paŭlo dua vizitis, 5.2.80, la sidejon de Vatikana Radio, kies celo — kiel diris, siatempe, Paŭlo sesa — estas tiu « *rekte kunligi la centron de katolikismo kun la diversaj landoj de la mondo, doni al la Papo la eblecon sin turni rekte al la fideluloj de la tuta tero, disvastigi lian parolon kaj lian penson, informi pri la agado de la Sankta Sidejo, eĥi la katolikan vivon en la mondo, montri la vidpunkton de la Eklezio, kaj, ĝenerale, prezenti la kristanan mesaĝon* ».

Johano Paŭlo dua konstatis kun ĝojo la progresojn de la Vatikana Radio, rilate teknikajn rimedojn kaj organizadon de la programoj. Precipe estis substrekita la graveco de la moderna kurtonda elsendilo, 500-kilovata, kun rotacianta anteno, kiu ebligas al la Vatikana Radio atingi eĉ la plej malproksimajn landojn, malgraŭ la amasiĝo de elsendantaj stacioj. La Papo ankaŭ emfazis, ke Vatikana Radio, per siaj elsendoj en 33 lingvoj, prizorgataj de homoj apartenantaj al pli ol 40 naciecoj, viroj kaj virinoj, laikoj kaj religiuloj (ĉi-lastaj, de 20 diversaj kongregacioj kaj ordenoj), estas bildo de la Universala Eklezio, kie neniu estas fremda.

Dum la vizito, la Papo ankaŭ mallonge interparolis kun P. Jacobitti, prizorganto de la Esperantlingva elsendo.

● Ekde Pasko (6.4.1980) Vatikana Radio surondigas ĉiudimanĉe, je 19.30 (ĉina horo), Meson en ĉina lingvo.

Ĝis nun, la ĉinaj fideluloj (tiaj daŭre ekzistas, malgraŭ la historiaj travivaĵoj de la lastaj jardekoj) kutimis aŭskulti la Meson laŭ la antaŭkoncilia tradicio, nome en latina lingvo, kaj mallaŭte. Por ili, la Meso estis precipe tempo de adorado kaj de preĝo, dum kiu oni aŭskultas predikon kaj oni ricevas komuniojn. La novaĵo de la Meso elsendata de Vatikana Radio estas la fakto, ke tiu Meso estas nun eldirata en ĉina lingvo, komprenata de la fideluloj.

La regula dissendado de Meso en ĉina lingvo estas aparte grava pro la signifo, kiun oni volis doni al ĝi. Kiel deklaris la prizorganto de la ĉina sekcio de VR, tiu Meso « *estas elstara signo de la unueco inter la kristanoj kaj la Sankta Sidejo, aparte grava por la ĉinaj kristanoj* ».

● Estis prezentita al la Papo, 5.4.1980, la unua numero de la pollingva eldono de la vatikana gazeto « *L'Osservatore Romano* ». La omaĝo estis farita de la direktoro de la publikaĵo, la pola sacerdoto Adam Boniecki.

Komence, la pollingva eldono estos nur monata, sed poste ĝi fariĝos semajna, samkiel la eldonoj en la lingvoj franca, angla, hispana, portugala kaj germana.

Kaŭze de sia monata ofteco, la pollingva eldono ne povos publikigi ĉiujn paroladojn de la Papo, kaj ĝi limiĝos al tiuj tekstoj, kiuj plimulte koncernas la Universalan Eklezion, aŭ kiuj rekte rilatas al Pollando.

La eldonkvanto dependos de la nombro de la abonantoj. La abono por Pollando kostas 11.700 lirojn aŭ 13 dolarojn (aerpoŝte, 13.500 lirojn aŭ 15 dolarojn).

La unua numero de la gazeto (duobla, por januaro kaj februaro) gastigas unuapage aŭtografan mesaĝon de Johano Paŭlo dua. « *Ĝi povu — estas dirite, interalie — ankaŭ en mia patrina lingvo plenumi sian taskon, servante al la apostola agado de la Sankta Sidejo en la nuntempa mondo* ».

● La sudana diocezo Rumbek ampleksas pli ol 95.000 kvadratajn kilometrojn (kvazaŭ duobla Svislando), kie vivas 611.000 homoj. Katolikoj estas 90.000, prizorgataj de apenaŭ 13 indiĝenaj sacerdotoj, unu religiulo kaj 4 misiistaj (kombonianaj) monaĥinoj.

Laŭ deklaro de la Episkopo, Mons. Gabriel Dwatuka Wagi, la loĝantaro rigardas favore al kristanismo, kaj ŝatus ekkoni la katolikan religion kaj ricevi la bapton. Sed la malfacilaĵoj estas grandaj, pro la malmulteco de la sacerdotoj, la grandaj distancoj, la manko de monrimedoj. Alia granda malfacilaĵo estas la fakto, ke sur la teritorio de la diocezo oni parolas 13 diversajn lingvojn.

● La itala jezuito Matteo Ricci, apostolo de la evangelizado de Ĉinio, estis memorigita de P. Bartolomeo Sorge, direktoro de la revuo « *Civiltà Cattolica* », okaze de la 400-jara datreveno de lia ordiniĝo.

Matteo Ricci, agante nekonformisme kaj antaŭenirante plurajn jarcentojn la paŝtistan vojon de la nuntempa Eklezio, engaĝis sin en la tradukado de la kristana mesaĝo en la terminojn, en la simbolojn kaj en la konceptojn de la ĉina kulturo, superante la sintenon, tiam ĝeneralan, de okcidentismo en la evangelizado.

La noveco kaj la originaleco de la metodo de Matteo Ricci konsistis en la respekto de la ĉina kulturo kaj de ĝiaj tradicioj, kaj en la adaptado de la evangelia mesaĝo al la pensmaniero kaj ankaŭ al la lingvo de Ĉinio, tamen en plena fideleco al la netuŝeblo de la Evangelio mem. Enigi la kredon en la ĉinan kulturon estis la sinteno, nekomprenata kaj ofte kontraŭstarata, de Matteo Ricci. Li ĵetis la fundamentojn por la disvastigo de kristanismo en Ĉinio; kaj lia strebado por interŝanĝo inter du mondoj tiel malsimilaj, kiaj tiuj itala kaj ĉina, estis aparte efika, tiel ke ankoraŭ nun ĉinoj memorigas Patron *Li Mateu* kiel unu el la okcidentaj homoj, kiuj plejmulte kontribuis al konkreta alproksimiĝo de la ĉina popolo al la okcidenta pensmaniero, sen rezigno pri la iama, antikva saĝeco.

● *Ekspozicio de Infandeseĝnaĵoj*. Libera temo. Dorse oni skribu nomon kaj aĝon. Rekompenco laŭdezire. Esperanto-Grupo, Str. Forn 19, Moyà, Barcelona, Hispanio.

LEGANTOJ SKRIBAS

● Post Esperanto-Kongresoj en Sorocaba kaj Juiz da Fora, kie mi kunlaboris en Diservo, oni kuraĝas eldoni la trimonatan Esperanto-bultenon « *Brazila Katoliko* », kaj komenci « *Brazilan Esperantistan Katolikan Organizon* ». Oni devas fari ion, ĉar ankaŭ brazilaj katolikaj esperantistoj respondecas rilate la 66-an Universalan Kongreson de Esperanto (kiu okazos venontjare en Brasilia), kaj ĉar brazilanoj ne estas sufiĉe informitaj pri la Esperantomovado (ofte oni konfuzas inter Esperanto kaj Spiritismo). Ni bezonas helpon kaj sugestojn; bonvolu paroli pri tio en EK.

Petro Urbaitis, Brazilo

● Speciale mi volas danki, ke en EK 3/80 vi trovis tiel multe da loko por la polaj raportoj. Tio tre ĝojigos la aktivulojn, kiuj poste des pli fervore agados; kaj la aliaj eble sekvos konkure.

Józef Zielonka, Pollando

● Diversaj malfacilaĵoj kaj malĝojigaj eventoj en la estraro de IKUE kaj en la redaktado de EK kaŭzis, ke multaj retiriĝas el la organizo. Krome, niaj kontaktoj kun la landa reprezentanto fariĝis preskaŭ neblaj: la abonitaj revuoj kaj menditaj libroj ne alvenas, aŭ alvenas kun grandega malfruo. Tio ege nin deprimas, se ni ne diru, ke ĝi nuligas la organizon.

Por ne pereĝi entute, ni decidis ekagi en la kadro de la Pola Animzorgado. Estus ĝojige, se la C.O. povus, pere de EK, kontaktigi ĉiujn samideanojn en la komuna agado; dume, ni penas tion fari en la socialisma zono.

Laste la Krakova Animzorgado aranĝis tri ege unuigajn kunvenojn. Bonvolu ne konsideri tion esceptaĵo, ĉar similaj okazaĵoj havas lokon ĉiusemajne en diversaj urboj de Pollando.

20.4.80 ni organizis pilgrimon al Wadowice, la naskiĝurbo de Papo Johano Paŭlo dua. Partoprenis dekoj da esperantistoj, malgraŭ la vetero preskaŭ vintra.

En la baptokapelo de la preĝejo, kie estis baptita Karol Wojtyła, troviĝas memorlibro, en kiu enskribiĝas ĉiuj pilgrimantoj en plej diversaj lingvoj, inter kiuj ne mankas Esperanto. Nia pilgrimo, jam la dua, ankaŭ lasis tie siajn postsignojn.

En apuda kapelo, ni kunvenis por remediti nian lokon kaj devon ene de la katolika Eklezio kaj de la Esperanto-movado. La solenan Meson en Esperanto celebris P. Józef Zielonka, kiu ankaŭ predikis.

Post la diservo okazis prelego kaj diskuto, sub gvido de Prof-ino Stefania Juzwowa. En la diskuto evidentiĝis terura manko de internacia informilo kaj ligilo inter la katolikaj esperantistoj, ĉar EK alvenadas tiel malregule, ke oni ne povas tion serioze konsideri.

27.4.80 ni aranĝis alian pilgrimon al Piekary Śląskie. Temas pri fama pilgrimloko, kien iras precipe silezianoj. Ĉijare ni vizitis la lokon unuafoje, sed ni planas fari tion ĉiujare. Tiamaniere ni volas ĉeesti en la eklezia vivo

kaj atesti pri nia fideleco. Ankaŭ tre gravas, ke multaj homoj al kutimiĝu kaj eble ekamu la Esperantistan liturgion, kantadon, preĝadon kaj paroladon.

En la kapelo de la Gracodona Bildo de Maria P. Zielonka celebris Sanktan Meson en la internacia lingvo, kio vekis intereson de la aliaj. Post la diservo la lokaj Esperantistoj prezentis al ni historion de la pilgrimejo, kaj P. Zielonka prezentis la tutpollandan planon de nia agado. Li speciale invitis al la pola Kongreso en Gostyń (23-27.7.1980) kaj al la Preĝtago en Ĉenstoĥovo (28.9.1980). Per la partopreno en publikaj kunvenoj ni montras nian ekziston, kaj ellaboras la agnoskon de la katolika hierarkio.

La 3-an kaj la 4-an de majo tuta Pollando festis tagojn de preĝa unuiĝo kun niaj najbaroj. En la eklezia sento ne mankis aktivado de nia Animzorgado. En ties kadro ni havis du gravegajn kontaktojn kun la orientaj gefratoj. Samtempe okazis ĉirilataj kunvenoj en Krakovo kaj Vilno. Eble al multaj ne estas konate, ke en Sovetunio aktivas katolikaj samideanoj, kaj en tio niaj kontaktoj tre gravas.

La Krakova Animzorgado celas unuiĝi ĉiujn samideanojn en la socialismaj landoj, kiuj ne havas eblecon, emon aŭ fidon al la okcidentanoj. En tiu celo ni strebas fari laŭeble plej multe, tamen ĉio bezonas paciencon kaj tempon.

Franciszka Bardecka. Pollando

Mi gratulas la polajn IKUE-anojn, kiuj, sub la lerta gvido de P. Zielonka, diverskampe aktivis. Tamen, mi ne povas kaŝi mian doloron pro la fakto, ke — se mi bone komprenis — oni flegas iun specon de organizo *paralela* kun tiu de IKUE, por la katolikaj Esperantistoj en socialismaj landoj. Mi esperas, ke mi maltrafe interpretis kelkajn aludojn entenatajn en la supra teksto; ja, dum estas akcepteble, ke en difinitaj landoj oni havu apartan agadmanieron, lige kun la lokaj cirkonstancoj, ne ŝajnas al mi akcepteble, kaj el la katolika kaj el la Esperantista vidpunkto, ke oni havu (fakte, se ne jure) du apartajn kaj paralelajn organizojn. Mi komprenas, ke kelkaj eventoj povis skui en diferencaj manieroj la IKUE-anojn en la unuopaj landoj; sed mi ne povas akcepti la ideon, ke fronte al unu kredo kaj al unu Paŝtisto oni havu du Esperantistajn organizojn.

Rilate la malregulan alvenon al Pollando de EK, tio estas, bedaŭrinde, vera, sed ĝi ne dependas de la C.O. en Romo, kiu regule sendadas la revuon, por plia distribuo, al la landa reprezentanto. La C.O. ne povas sendi la revuon rekte al la polaj abonantoj, ne nur ĉar la registrita sendado al unuopuloj estus terure multekosta, sed precipe ĉar la C.O., malgraŭ dekoj da leteroj, ankoraŭ ne sukcesis koni la nomojn de la polaj abonantoj por 1979 kaj 1980. Malgraŭ tio, ke ankoraŭ kotizoj por 1980 ne estis transpagitaj al Romo, tamen oni daŭrigis sendi al la pola reprezentanto pakajojn kun EK (en unu jaro, tio faras 130 kilogramojn!). De pasintjara aŭtuno mi oftege preĝpetis la intervenon de pluraj polaj IKUE-zorgantoj por solvi la problemon de la silento de P. Gotter; sed nur antaŭ nelonge mi ricevis la informon, ke tiu silento « ne estis pro lia kulpo », kaj ke li promesis baldaŭ ordigi ĉion.

Mi aldonas, ke pro la necerta situacio, en kiu mi troviĝas rilate polan abonantaron (kiu konsistigas preskaŭ 1/3 el la totalo), en ĉi tiu jaro 1980 ankaŭ ekestis malfruo en la aperigo de EK: dum en 1978 kaj 1979 la revuo aperis regule, komence de la koncerna monato (aŭ eĉ jam fine de tiu antaŭa), en 1980 EK aperis fine de la koncerna monato, ĉar je ĉiu numero mi demandis de mi mem, kiom da kopioj mi presigu, kaj atendadis (vane), ĝis la laste tolerebla dato, eksciĝis ion pri la polaj abonantoj (pri tio, oni bonvolu relegi miajn konsiderojn en EK 10-11/1979, p. 176).

Antonio De Salvo

DIPLOMATA RESPONDO

La itala Ĉefepiskopo Luigi Poggi, vatikana ŝarĝito pri specialaj taskoj, vizitis Hungarion en aprilo. Interalie, la 23-an de tiu monato li vizitis la Ĉefepiskopan Altlernejon de Eger, kie mi studas.

Mons. Poggi partoprenis en la Sankta Meso, kaj predikis en itala lingvo al la alumnoj. Poste, en la aŭlo de la Seminario, li transdonis personan mesaĝon de la Papo, kaj ebligis, ke oni faru al li demandojn en latina lingvo. Mi demandis, kion li opinias pri Esperanto, kaj kiaj eblecoj, liaopinie, montriĝas por la Internacia Lingvo en la Katolika Eklezio.

Mons. Poggi respondis konvene al diplomato: "Bedaŭrinde, via movado ne havas multe da mono por ke la lingvo propagandiĝu en la tuta mondo kaj en la Eklezio; oni bezonus riĉan subtenanton, kiu donu monon por eldoni literaturaĵojn".

Persone, mi kredas ke ni ne bezonas tian riĉan subtenanton, se ni kredas je nia movado kaj vidas la celon: "por ke ĉiuj estu unu" (Jo 17:21).

Tibor Juhász, Hungario

HEROLDO JUBILEAS

En aprilo 1920, ekzakte antaŭ 60 jaroj, aperis en la vilaĝo Horrem apud Kolonjo (Germanio) la unua numero de la sendependa internacia gazeto "*Esperanto Triumfonta*", kiu, kelkajn jarojn poste, alinomiĝis "*Heroldo de Esperanto*".

Gia fondinto, 26-jara, Teo Jung, kun granda optimismo, fervoro kaj obstino gvidis ĝin kaj dum pli facilaj jaroj — kiam la gazeto, en la '20-aj jaroj, aperadis 10-paĝa dufoje semajne — kaj dum pli malfacilaj jaroj, kiam li, en 1936, devis forlasi sian propran landon kaj instaligi en Scheveningen (Nederlando).

En januaro 1962, pro emeritiĝo, Teo Jung transdonis la gazeton al Ada Fighiera-Sikorska, kiu plue redaktas ĝin. Tiu-ĉi nova periodo de la redaktado okazis unue, dum 17 jaroj, en Bruselo, kaj ekde aprilo 1979 ĝi efektiviĝas en Madrido.

La 14-an de aprilo 1980 aperis la 1664-a numero de "Heroldo de Esperanto", kiu daŭre estas la plej ŝatata kaj la plej ofte aperanta internacia Esperanto-gazeto.

Detala historio de "Heroldo" ĝis 1962 estas priskribita en la biografia libro de Teo Jung "Ĉiu ĉiun", aperinta pasintjare ĉe la eldonejo TK/Stafeto.

AGADO ĈE SEMINARIOJ

Al diversaj katolikaj Esperanto-parolantoj en Mez-Eŭropo
Estimataj gesamideanoj!

Ni petas de vi persone helpon al grava paŝo rilate al la disvastigo de Esperanto en nia Eklezio.

Unue ni prezentu nin: la subskribantoj estas katolikaj sacerdotoj esperantistaj de la germana diocezo Freiburg, Sudgermanio.

Bernd Müller, naskiĝis 1946, sacerdotiĝis 1978. Nuntempe vikario en D-7742 St. Georgen.

Bernhard Eichkorn, naskiĝis 1934, sacerdotiĝis 1960. Nuntempe estas pastro en D-7731 Unterkirnach, samtempe regiona dekanano en eklezia regiono Schwarzwald-Baar.

Ni bedaŭras, ke Esperanto ne estas tre forta en la Eklezio, kontraŭe al la internacieco de nia Eklezio kaj de nia kristana kredo. Tial ni celas disvastigi Esperanton en speciale grava grupo: inter la seminarianoj. Ni memoras, ke en nia seminaria tempo la internaciaj kontaktoj estis tre malgrandaj. Tial ni volas kunvenigi seminarianojn el diversaj landoj per Esperanto aŭ al rondoj internaciaj, kie ili rimarkas, ke Esperanto estas taŭga internacia rimedo.

Precipe la porpastraj seminarianoj ŝajnas al ni grava grupo por disvastigi Esperanton kaj starigi internaciajn rilatojn. Ili ja estas la venonta gvid-tavolo de la eklezio. Ankaŭ estas ne tro malfacile atingi la seminariojn.

Precize ni planas jenon:

1. Ni sendos, ĉirkaŭ dufoje en la jaro, invitilojn publikigindajn al la seminarioj.
2. En ili ni invitas al aranĝoj interesaj por seminarianoj. Tiajn aranĝojn ni organizos.
3. Samtempe ni dissendas kelkajn informojn interesajn al seminarianoj rilate al Esperanto en eklezio kaj mondo.

Nun necesas, ke iu loke konata persono transdonu, kaj eble traduku, niajn invitilojn kaj informojn; ni serĉas personojn, kiuj regule estu pretaj al tia helpo.

1. Ni bezonas la adreson de la porpastraj seminarioj. Bonvolu sendi al ni la adresojn de la al vi konata(j) seminario(j).
2. Ĉu vi povas nomi al ni personon eble kapablan esti kontaktpersono al seminario? Devas esti iu, kiu komprenas Esperanton kaj kiu persone povas atingi tiun seminarion.
3. Ĉu eble vi konas interesiganton pri Esperanto en via seminario aŭ proksime de ĝi kaj vi mem povos peri (eble ankaŭ traduki) al tiu persono niajn esperant-lingvajn informojn?
4. Eble vi scias Esperantiston, kiu verŝajne havas kontaktojn al sia porpastra seminario, aŭ kiu povas starigi tiujn kontaktojn. Ni petas vin, sendu al ni tiun adreson.

Vi multe helpas nin, se vi povas respondi almenaŭ al unu de la supraj de-

mandoj. Ni planas longjaran agadon en tiu direkto kaj ĉiam ni estas scivo-
lemaj al viaj konsiloj.

Ni salutas vin en nia sinjoro Jesuo Kristo

Bernd Müller - Bernhard Eichkorn

Ĝis nun jenaj aranĝoj estas firme planitaj:

— Migrad-Ferioj en Serneus (Svislando), 27.7-9.8.1980; partoprenos ger-
manlingvaj familioj. Informoj pri Esperanto en Eklezio kaj mondo. Kursoj
por komencantoj. Prezreduktoj por Esperanto-parolantoj.

— Skiferioj en Villanders/Villandro, Italio, 27.12.80-3.1.81; partoprenos
nur Esperanto-lernantoj aŭ-parolantoj. Vespere bibliaj laborrondoj. Kursoj
pri Esperanto.

— Printempaj Skiferioj en Serneus (Svislando), komence de marto 1981
unu semajnon. Precipe por studentoj interesiĝantaj pri Esperanto. In-
formoj pri Esperanto en Eklezio kaj mondo. Kursoj por komencantoj
kaj progresintoj. Prezreduktoj por Esperanto-parolantoj.

Esperanto-parolantoj ĉia-aĝaj estos ĉiam bonvenaj.

Precizajn informojn oni ricevas ĉe:

Katholisches Pfarramt
Kirchplatz 4
D-7731 Unterkirnach,
F.R. Germanio.

● La 40-a Hispana Kongreso de Esperanto okazos en Madrido, de la 19-a
ĝis la 24-a de julio 1980. La programo antaŭvidas, interalie, Esperantlingvan
Meson en la Kongresejo (*Escuela Superior de Minas, Str. Rios Rosas 21,
Madrid 3*) dimanĉon 20.7.1980 je 18 h, Esperantan Ekspozicion en la Nacia
Biblioteko, Artan Vesperon, Viziton al la Astronomia Observatorio, prob-
lablan inaŭguron de strato kun esperantista nomo, plurajn ekskursojn kaj
vizitojn, ktp.

Informojn donas: Madruda Esperanto-Liceo, str. Atocha 98-4°, Madrid
12, Hispanio.

● La 51-a Itala Kongreso de Esperanto havos lokon en Manfredonia
(Prov. Foggia) de la 6-a ĝis la 13-a de septembro 1980.

La programo antaŭvidas, interalie, Esperantlingvan Meson en la Pre-
ĝejo *Santa Maria Maggiore* de Siponto, folkloran vesperon, dancadon, pre-
miadon de gajnintoj de literaturaj konkursoj, viziton de famkonataj lokoj
(salejoj de *Margherita di Savoja, Grottoj de Castellana*, ktp.). Kongresanoj
rajtos senpage vojaĝi sur urbaj trafikiloj kaj eniri Muzeojn. Funkcios po-
rokaza poŝtoficejo kun speciala stampo.

Informojn donas: FEI, via Villoresi 38, I-20143 Milano, Italio.

● Okaze de la *Somera Esperanto-Universitato* en Gyula (Hungario), kiu
havas lokon ĉiujare, katolikaj pastroj celebras Meson en Esperanto en la ĉefa
preĝejo de la urbo. Kutime partoprenas en ĝi ĉirkaŭ 50-100 personoj.

Ĉijare, la Meson celebras verŝajne P. Aleksandro Szénási el Eger.

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkotizon al la landaj reprezentantoj, samtempe avertante pri tio la Centran Oficejon (por ke tuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La jara kotizo de membro-abonanto estas 20 svisaj frankoj aŭ egalvaloro. Pro la daŭra ŝanĝiĝo de la kurzoj de valutoj, precipe de svisa franko, la sube indikitaj egalvaloroj havas nur informan celon.

Argentino

P. Bruno Ostropolski
Av. Libertad, 75
AR - 3360 Obera, Misiones

Aŭstralio

C.A. Sullivan
56 Royal Terrace
Hamilton
Queensland 4007

Aŭstrio

W. Mudrak
Beatrixgasse, 19/9
A - 1030 Wien III - p.k. 105.713
ŝil. 160

Belgio

E. Paesmans
Lange Koepoortstr. 64
B - 2000 Antwerpen
p.k. 000-0414589-11; b. fr. 350

Brazilo

P. Pietro Urbaitis
caixa postal 4421
BR - 01000 S. Paulo, S.P.

Britio

J. Harris
26, Dare Road
Birmingham B23 6PD
br. p. 6

Ĉeĥoslovakio

Aleš Berka
Na Vyhlídec 1002, p.s. 28
CS - 755.01 Vsetín

Francio

P. R. Degrelle
11, cours Léopold
F - 54042 Nancy Cedex
p.k. 2555 38 L, Nancy
fr. fr. 52

F. R. Germanio

J. Kondor
Alte Schloss-Str. 25
D - 545 Neuwied 21 - Engers
p.k. 113726 - 673, Ludwigshafen
Rhein; gm 24

Hindio

P. O. M. Lucas, ofm Cap.
Shanti Ashram, Gandhipuram
Coimbatore 641012

Hispanio

Miguel Martínez
Av.da San José 105, pral 3a
Zaragoza - pes. 850

Hungario

P. Lajos Kòbor
Fö u. 58
H-9365 Dénesfa

Irlando

P. J. O'Reilly
«Monksilver», Howth Summit
Co. Dublin

Islando

Torfi Ólafsson
Melhaga, 4 - 121 Reykjavík

Italio

P. Duilio Magnani
Viale C. Zavagli, 73
I - 47037 Rimini (Forlì)
p.k. 28/19956 (UECI) -
lir. 10.000

Japanio

Hatirō Matubara
Nanimatu-tyō 4/5
596 Kisiwada-si, Oosaka-hu

Jugoslavio

P. Prof. Franjo Gruić
Strossmayerov trg, 5
YU-54400 Đakovo
din. 200

Kanado

Sino P. Proulx
790, 80-ème rue Est
Charlebourg 7 Québec
G1H 1A9

Kolombio

Jorge Velásquez G.
Apartado aéreo 51740
Medellín

Suda Koreo

P. Kiseng Kim
I.P.O. Box 2752 - Seoul

Madagaskaro

Roger Randrianekena
BP 14
Ambatondrazaka

Meksikio

P. J. M. Claramunt
Apartado postal 318
Oaxaca, Oax

Nederlando

S. P. Smits
Dunantstraat, 164
NL 2713 VC Zoetermeer
p.k. 685124 - gld 25

Norvegio

S. Murak
Semsvn 166, N - 1370 Asker

Nov-Zelando

G.D. Raynor
49 Sunny Grove
Wainuiomata, Wgtn

Pollando

P. J. Gotter
Trzebnice 113
PL-59.312 Chocianowice

Svislando

P. Scherer - Graber
Erlen-Str. 58
CH - 6020 Emmenbrücke/Lu
sv. fr. 20

Schweiz. Kath.Esperanto-Verein,
Luzerner Kantonalbank
en Emmenbrücke
poŝtĉeka konto 60-3852
Luzern

Tajlando

P. M. Perray
GPO Box 1846 - Bangkok

Tajvano/Formozo (Ĉinio)

P. J. B. Se Ĉien Kao
P.O. Box 1269
Taipei 100, Taiwan R.O.C.

Urugvajo

R. Zeballos Morales
Av. Centenario 3099, C., Ap. 805
Montevideo

Usono

Mark B. Weddell
P.O.B. 1042
Indian Rocks Beach
Florida 33535
us. dol. 13

Centra Oficejo

IKUE, via Berni 9
I - 00185 Roma (Italia)
tel. (06) 7588388
poŝta konto 23290000

